

**Jarraporto de la TEJO-estraro, -stabo kaj
-komisiitoj
2017**



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam

Nederlando

www.tejo.org

Kompilita de Charlotte Scherping Larsson

Badajoz, la 6-an de aŭgusto 2018

Enhavo	3
Enkonduko	5
Administrado	6
Financoj	9
Subvencioj	9
Aktivula trejnado	11
Edukado	13
Subvenciitoj por KER-ekzamenoj	14
Eksteraj rilatoj	14
Forumo Junulara Eŭropa	15
Konsilkonsilio	17
UNITED	17
UN kaj IKRJO	18
Unesko	18
Talento	19
Kulturo	20
Kongresoj	20
IJK 2017	20
IJK 2018	21
Landa Agado	22
KODEJO	22
IJK: partoprenigo de afrikanoj, trejnado, donaco de libroj	22
Novaj kaj reaktiviĝintaj Landaj Sekcioj	23
Modeloj de statuto aŭ regularo por sekcioj de TEJO	23
Serĉado de partneroj por projektoj	23
Kreo de la Aktivula Akademio	23
Esperanto-standoj	24
Novaj komisiitoj	24
Strategia planado	24
Duolingo-kursfinintoj	25
Merkatiko	25
Movada Rubriko	26
Kontakto	26
TEJO-aktuale	27

Pasporta Servo	28
Scienca kaj faka agado	28
Komunikado	28
Stabo, EVS, administra subvencio	31
Sociaj retejoj	32
Volontuloj	33
Olga Sevcenco	33
Valia Tamvaki	34
Paul Helly	34
Gilbert Niyukuri	35
Mallongigoj	36
Suplementoj	39
Suplemento 1	39
Suplemento 2	40

Enkonduko

raportas Hoan Tran (Ĝojo), prezidanto

Saluton!

Finfine aperas antaŭ viaj okuloj la jarraporto 2017 preparita de la Estraro, oficistoj, komisiitoj, komitatanoj kaj volontuloj. Estas multo por rakonti pri kio ni jam faris; detalojn vi certe povos legi en sekvantaj paĝoj. Ĉi-tie mi ŝatus prezenti la ĉefajn trajtojn kiuj elstaras en la agado de TEJO pasintjare.

La jaro 2017 vidis la daŭrigon kaj disvolviĝon de la transkontinenta projekto AEJK (Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo). Kadre de la projekto trejnadaĵ sesioj okazis dum la Esperanto-aranĝoj por junuloj. La plej notinda afero estas la 73a Internacia Junulara Kongreso en Aného, Togolando, kiu estas la 1-a kongreso okazigita en Afriko. Pluraj trejnad-sesioj estis organizitaj kaj trejniĝis multe da esperantistaj afrikanoj dum IJK.

Pasintjare finiĝis la Projekto pri Aleksteria Komunikado ECY kunordigita de la organizo kaj komenciĝis 2 novaj kadre de Erasmus+, nome Lingva Instruisto kaj Genra Egaleco, en kiuj TEJO partneriĝis kun aliaj eŭropaj Esperanto-Organizoj.

Koncerne al administrado, dum la 73a IJK en Aného, Togolando estis elektita la nova Estraro por la mandato 2017-2018, inkluzive de 3 gejunuloj el Eŭropo, 2 junulinoj el Azio kaj 2 junuloj el Ameriko. La elekto reflektis kreskon de nombro kaj la diversecon de la konsisto de la organiza gvida teamo. Sub la gvido de prezidanto Enric Basaltar, la Estraro verkis la strategio-planon 2018-2020 kaj la realigplanon por 2017-2018. Ambaŭ estis aprobitaj de la Komitato dum la Komitata Kunsido en Pollando fine de 2017.

La Estraro ne povis konservi sian idealan konsiston ĝis la fino de la mandato ĉar dum Junulara Esperanto-Semajno 2017 en Pollando demisiis prezidanto Enric Basaltar; sekvis tion la demisio de Doniben Jarmillo Simpson, estrarano respondeca pri Merkatiko. La tiama Estraro kunlabore kun la Elekta Komisiono ekserĉis novajn aktivulojn por plenigi la vakajn postenojn kaj respondecojn kaj estis elektitaj 2 novaj estraranoj.

Agado en eksteraj rilatoj estis forte antaŭenigita: TEJO-aktivuloj estis senditaj al diversaj eventoj ekster Esperantujo, nome al forumoj de Unesko, al trejnadoj de Forumo Junulara Eŭropa (FoJE), kaj eĉ al UN-nivelaj eventoj, reprezentante la organizon, interŝanĝante spertojn en pledado por junularaj rajtoj, enrajtigo, kaj kapabligo por gejunuloj!

Ĝuu la legadon!

Hoan Tran (Ĝojo)

Prezidanto de TEJO

Administrado

raportas Charlotte kaj Ĝojo, ĝenerala sekretario

Estis kelkaj gravaj decidoj kaj ŝanĝoj de la reglamento: dum IJF estis decidita pri unujara mandatperiodo por la estraro, kaj la estraro elektita dum IJK en Aného estis elektita por unu jaro. Aliaj ŝanĝoj por subteni la juran memstariĝon de TEJO de UEA estis faritaj: notaria plenumo de la Statuto, la akiro de subskriborajto de la Estraro kaj la malfermo de sendependa TEJO-bankokonto. Ĉio okazis en junio 2017.

En aŭgusto, la komisiono pri Homaj Rimedoj ricevis la novan nomon Talento. En la jaro 2017 dum JES, la strukturo de la komisionoj ŝanĝiĝis. La ĉefaj respondecoj de TEJO restas en komisionoj, kaj la aliaj iĝis interesgrupoj. Ekestis nova komisiono pri Teknologio.

Jen la listo de la komisionoj en 2017:

- Komisiono pri Adoleska Agado
- Komisiono pri Aktivula Trejnado
- Komisiono pri Edukado
- Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
- Komisiono pri Talento (antaŭ aŭgusto 2017, Homaj Rimedoj)
- Komisiono pri Merkatiko
- Komisiono pri Kulturo
- Komisiono pri Landa Agado
- Komisiono pri Moviĝebloj
- Komisiono pri Pasporta Servo
- Komisiono pri Scienca kaj Faka Agado

Kaj post la ŝanĝo al komisionoj kaj interesgrupoj:

Komisionoj:

- Eksteraj Rilatoj
- Aktivula Trejnado
- Landa Agado
- Merkatiko
- Kongresoj
- Teknologio
- Talento

Interesgrupoj:

- Adoleska Agado
- Edukado
- Genra Egaleco
- Kulturo
- Scienca kaj Faka Agado
- Universitata Agado

En la Centra Oficejo deĵoris volontuloj:

J r mie Bert (Francio) ĝis januaro 2017

Michal Mat  šov (KuboF), Slovakio ĝis januaro 2017

Pierre Vittet, ĝis la 31a de a gusto 2017

Alessandro Bonfanti (Italio), de septembro 2016 ĝis septembro 2017

Ana Stretcu (Rumanio) ĝis septembro 2017.

F riel Djenidi (Francio) ekde februaro 2017 ĝis februaro 2018

Olga Sevcenco (Moldovio) alvenis en septembro 2017.

Paul Helly (Francio) alvenis en oktobro 2017.

Valia Tamvaki (Grekio) alvenis en oktobro 2017.

Ana ne estis esperantisto kaj lernis Esperanton dum sia volontulado. Pierre volontulis kadre de EVS ĝis la 22a de majo kaj ekster tiu kadro ĝis la 31a de a gusto. Poste li estis dum iom da tempo da re dungita por prizorgi farenaĵojn rilate al la AEJK-projekto. Kiam estis la demisio de la oficisto de UEA Tobiasz Ka mierski, ekde septembro TEJO perdis surlokan mentoron por la volontuloj, kaj ekser cis nova(j)n.

Komencis novaj volontuloj - Paul Helly el Francio, kaj du ne-esperantistoj, Olga Ŝevcenco el Moldovio kaj Valia Tamvaki el Grekio. Ili alfrontis kelkajn malfacilaĵojn je la komenco de la volontulado. Pro diversaj kialoj (interalie komunikproblemoj inter TEJO kaj la CO), la suma kvanto de volontuloj inter TEJO kaj UEA superis la kvanton de loĝlokoj. La ĵus enoficiĝinta estraro, sen multe da sperto, devis tuj serĉi alternativajn loĝlokojn, kio daŭris bedaŭrinde pli da tempo ol oni antaŭvidis. Ĉefa lernosperto de tio estas la nepreco de sperta(j) respondeculo(j) surloke en Roterdamo por bonvenigi kaj zorgi pri la volontuloj.

Jérémie Bert (Francio) kaj Michal Matúšov (KuboF), Slovakio finis sian volontuladon en januaro 2017.

En decembro 2017 TEJO ricevis la sciigon ke la EVS-volontula projekto de Jérémie Bert el Francio kaj Michal Matúšov (KuboF) el Slovakio, estis elstarigita en la retejo de la nederlanda nacia agentejo inter la “plej bonaj praktikoj”, kaj ricevis laŭdon interalie por bone mastrumita projekto.

Oficisto Mounir Abjiou el Maroko multe laboris por subvencioj kaj por la sukceso de la administra flanko de la EVS-projektoj. Post la fino de sia volontulado, Michal Matúšov (KuboF) kontribuis kiel oficisto pri teknikaj aferoj. Fatma Eroĝlan laboris kiel projektmastrumisto por ECY. Łukasz Żebrowski kaj estis oficisto pri Landa Agado - legu pli pri tio en la parto pri Landa Agado - kaj okupiĝis pri IJK en Togolando. Legu pli pri tio en la parto pri IJK. Giorgio Nikolov (Ariel Palmer) laboris kiel komunikisto, okupiĝis pri sociaj retoj kaj grafikaĵoj; oni trovas la rezultojn de tia agado en la parto pri sociaj retejoj. Quentin Weber-Seban komencis labori kiel KER-oficisto en septembro 2017, kaj oni vidas lian laboron en la raportoj pri KER.

La aktivuloj de TEJO – estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, volontuloj kaj oficistoj – regule raportas pri sia agado. Iliaj raportoj aperas en la formo de la monata cirkulero, dissendata pere de la komitata diskutlisto. Ĉiuj arkivaj numeroj estas legeblaj ĉe la paĝaro de TEJO (<http://tejo.org/dokumentoj-kategorio/cirkuleroj/>) kaj en Trello (<https://trello.com/b/ofN9gh4J/tejo-cirkulero>).

Financoj

La spezraporto estas ĉi tie:

https://drive.google.com/file/d/1rtXgkAS_DUuGdzCeQhittNqDQmfhFlph/view?usp=sharing

Bilanco ankoraŭ ne pretas.

Bilanco, kiu prezentas situacion de aktivo kaj kapitalo de TEJO je la momento 31/12/2017 ankoraŭ ne estas farita. Ekde 2016 TEJO estas jure memstara organizo, sed la librotenada sistemo de TEJO ankoraŭ estas en la sistemo de UEA, kaj kelkaj saldoj de TEJO-kontoj estas neklaraj kaj eble ne plene ĝustaj. Ĝis nun mankas klaraj informoj pri ŝuldo inter TEJO kaj UEA. Ekde 2018, la financoj de TEJO estas librotenataj en aparta sistemo, do ekde tiam ŝuldoj inter TEJO kaj UEA estas pli klaraj. En junio de 2018, la kasisto de TEJO vizitis la CO-n por solvi aferojn sed ne sukcesis. Ĝis nun la financa fako de UEA ankoraŭ laboras kaj esploras por solvi ŝuldojn de pasintaj jaroj kaj malĝustajn saldojn de kelkaj TEJO kontoj.

La jarraporto estis aprobita, sen aprobo de la financoj, pro manko de bilanco.

Subvencioj

raportas Mung Bui (Feliĉa), kasisto, kaj Mounir Abjiou, oficisto:

Dum la jaro 2017, TEJO pludungis Mounir Abjiou kiel plentempan oficiston pri subvencioj. Per la laboro de Mounir TEJO ricevas jenajn subvenciojn dum 2017:

- Eŭropa Volontula Servo (EVS): TEJO ricevis 34 741.80 EUR de EVS subvencio por la jenaj volontuloj: Pierre Vittet (ĝis majo 2017); Olga Ŝevcenco (ekde Septembro 2017 ĝis Aŭgusto 2018); Paul Helly (ekde septembro 2017 ĝis septembro 2018); Vasiliki Tamvaki (ekde Oktobro 2017 ĝis Aŭgusto 2018). Pierre laboris kaj por TEJO kaj por UEA. Do, TEJO pagis al UEA 1/3 de la subvencio de Pierre por la UEA-labortempo

kaj kunhavigis 1/3 da kostoj de Pierre kun UEA. En oktobro 2017 TEJO subvencipetis por ricevi 3 pliajn volontulojn. La projekto estis aprobata en decembro 2017, sed novaj volontuloj ne komencos antaŭ la fino de somero en 2018. Estas nepre atentinde, ke la kostoj de la EVS-programo estas multe pli altaj ol la enspezoj. Pro tio la estraro ellaboris financan planon kiu ebligas ekvilibran situacion en la estonteco.

- Administra subvencio: En 2017, TEJO ricevis 27 558 EUR de EACEA kiel administra subvencio, por kovri kontribuon (ĉirkaŭ la duonon) de la salajraj kostoj kaj kontribuon al la kostoj de 4 kunsidoj (du estrarkunsidoj kaj du komitatkunsidoj). Per la subvencio TEJO dungis parttempe ĉi tiujn oficistojn: Łukasz Żebrowski (kiel landagadiston kaj IJK-oficiston), Michal Matúšov [KuboF] (kiel komputiliston), kaj Giorgio Nikolov [Ariel Palmer] (kiel komunikiston). En 2017 TEJO pretigis kadran administran subvencipeton por tri jaroj (2018-2020). Fine de majo 2018 ni ricevis pozitivan pritakson. Laŭplane estas 3 plentempaj oficistoj kaj 5 kunsidoj kun sumo 44 973 EUR ĉiujare. Tio estas grava subvencio por plani la agadojn de TEJO dum la venontaj jaroj.
- Erasmus+ KA2 KapabloKonstruado: en la unua duono de 2017, TEJO ankaŭ prizorgis la kapablokonstruan projekton inter Eŭropo kaj Ameriko, sed pro diversaj kunordigaj kialoj, plejparte lastmomentaj, la subvencipeto ne atingis sukcesan rezulton.
- Erasmus+ KA2 Strategiaj Partneradoj: per la laboro de la firmao Kosmo Strategio Ltd. estis akiritaj la jenaj subvencioj:
 - Instruista projekto (BPT - Best Practices on Teaching): 12-monata projekto, 51 675 EUR
 - Projekto “Florigu Egalecon inter Junuloj”, (FEY - Foster Equality in Youth): 16-monata projekto, 59 945 EUR

En 2017 disvolviĝis preskaŭ la tuta projekto AEJK - Afrikeŭropa Junulara Kapablo (EAEY - Empower African and European Youth), akirita en 2016 danke al la laboro de Kosmo Strategio Ltd. En 2017 okazis tri renkontiĝoj kaj

trejnadoj, dum IJF, IJK kaj JES, kaj permesis la okazigon de la unua Internacia Junulara Kongreso en Afriko.

En 2017 ankaŭ finiĝis la 13-monata projekto pri Efika Komunikado, financita de Erasmus+ KA2 Strategiaj Partneradoj (ECY - Effective Communication for Youth).

En julio 2017 kunlabora kontrakto inter TEJO kaj Kosmo estis subskribita, por stabiligi la kunlaboron kaj permesi taŭgan planadon por ĉiu limdato.

Aktivula trejnado

raportas Charlotte Scherping Larsson, respondeca estrarano

Estraranoj pri Aktivula Trejnado estis Michael Boris Mandirola ĝis fino de la mandato kaj sekve Charlotte Scherping Larsson.

La komisiito pri aktivula trejnado ekde januaro 2017 estis Karina Maĥosa.

Ekde novembro la komisiitaro pligrandiĝis kaj konsistas el 3 personoj - Léon Kamenický (ĉefkomisiito), Tomáš Stano (okupiĝas pri dokumentoj kaj financoj), Karina Maĥosa (okupiĝas pri enhavo de trejnadoj kaj homaj rimedoj).

Danke al engaĝiĝo de pluraj personoj, la jaro 2017 estis fruktodona tempo por la Aktivula Trejnado en nia organizo. Ĝi estis jaro de granda evoluo kaj kresko en kampo de neformala edukado. Du kernaj projektoj kiuj okazis estas AEJK kaj Trejnu La Trejniston (TTT), en kiuj partoprenis pluraj junuloj kaj TEJO-aktivuloj.

Pere de AEJK okazis trejnado “Iĝu trejnisto”, dum kiu 17 homoj estis trejnitaj kaj ekhavis sciojn kaj kapablojn por bonkvalite liveri trejnadojn en organizo. Malgraŭ problemoj pri vizoj, la trejnadon sukcesis partopreni 4 partoprenantoj el afrikaj landoj. Ĝi estis tre intensa kaj sukcesa trejnado. Trejnado estis realigita plejparte danke al homoj, kiuj partoprenis ETEY-projekton.

Dum IJK okazis la dua parto de la AEJK projekto. Ankaŭ tie ne mankis trejnadoj por aktivuloj. Partoprenantoj de IJK povis profiti de la sekvaj trejnadoj: Gvidado, Organizu Vian Landan Agadon, Kontraŭ-diskriminiacia trejnado, Kiel krei laborteamon per ludoj, Lingvoinstruado kaj

"Tempomastrumado" (de KuboF Hromoslav kaj Iwona Zalewska) kaj "Sukcesa introvertitulo" (Karina Maĝosa).

La trejnadojn gvidis interalie homoj, kiuj trejniĝis dum la unua parto de la projekto (dum IJF).

Alia projekto estis Trejnu La Trejniston, kunordigita de BES, Bialistoka Esperanta Socio; ĝi ne estis projekto de TEJO, tamen la trejnistoj kaj la plejparto de la partoprenantoj estis TEJO-aktivuloj kiuj ankaŭ aktivas en aliaj organizoj. Pere de tiu projekto okazis trejnado en Munkeno en aprilo kaj sep el la trejnitoj estis TEJO-aĝaj.

Trejnadoj estas gravaj partoj de multaj projektoj, en kiuj TEJO estas enplektita. En projekto ECY (Efika Komunikado por Junularo) okazis trejnadoj pri socia merkato en Belgujo (kadre de Peko) kaj organizado de kampanjoj en Hispanujo (flanke de la Hispana Kongreso de Esperanto). Malgranda ateliero pri tiuj temoj okazis ankaŭ dum malferma plurobliga evento en Esperanto kaj la slovaka septembre en Bratislavo.

Du novaj projektoj, en kiuj trejnadoj estas kernaj, estis lanĉitaj: Florigu Egalecen inter Junuloj (FEJ) kaj la Instruista projekto. FEJ havis sian komencan kunsidon dum oktobra KKPS en Nederlando, en kiu oni diskutis la plej gravan celon de la projekto, la plurtagan trejnadon dum la IJK 2018 en Hispanio. Dum KKPS okazis kadre de FEJ ankaŭ metiejsesioj pri ligitaj temoj, kiujn gvidis Paulina Kozuchova kaj Ariel Bonkorpa.

Okazis ankaŭ kelkaj trejnadoj ekster la projektoj. Ekzemple dum JES 2017-2018 okazis trejnado pri eksteraj rilatoj gvidata de Michael Boris kaj Saŝa Murr, por kapabligi niajn aktivulojn en tiu kampo kaj specife trejni la partoprenontojn por EJO/YO!Fest 2018, kaj Charlotte Scherping kaj Saŝa Murr faris trejnadon pri decidfarado.

La trejnistaro de TEJO funkcias bone, bone kunlaboras kaj estas plena je entuziasmo kaj ideoj. Novembre okazis la unua TTR - TEJO-Trejnistara Renkontiĝo. Tie renkontiĝis ĉirkaŭ 10 motivitaj TEJO-trejnistoj, kiuj partoprenis trejnadojn pri didaktiko kaj diskutis pri AT. Estis ankaŭ diskutita kaj proponita reglamento por la TEJO-trejnistaro.

Post la trejnista renkontiĝo estis kreita la teamo de la komisiono. Ĝi konsistas el Léon, Tomas kaj Karina, kiuj gvidos la komisionon dum 2018.

Estis enkondukita monata kunsido kun trejnistoj por komuniki kune pri estontaj planoj kaj la unua kunsido okazis en decembro.

Krome estis evoluo en la retkursoj de TEJO. Kadre de la projekto ECY estis ja lanĉitaj 5 retaj kursoj pri merkato, organizado de eventoj, komunikkanaloj, organizi kampanjojn kaj kiel vendi ideojn.

Pri la jam ekzistantaj, 10 homoj sekvis la komencantan retkurson pri eksteraj rilatoj.

Edukado

Raportas la respondeca estrarano, Ĝojo, kaj la komisiito Querino Neto

En 2017 TEJO partneriĝis en la Erasmus+ projekto pri Lingva Instruisto kiu celas trejni nespertajn junajn esperantistojn kiuj deziras fariĝi kurso-gvidanto aŭ instruisto pri Esperanto.

La projekto daŭras unu jaron (de 01/09/2017 ĝis 31/08/2018) kaj konsistas el diversaj kunsidoj kaj trejnado-sesioj. Kiel iniciinto kaj partnero de la projekto, TEJO ĉeestis la komencan eventon en Trento, Italio pri interkonsento de laborreguloj, tasko-divido inter aliaj aferoj. Poste sekvis la serĉado de trejnotoj kaj unua trejnado-sesio dum Junulara Esperanto-Semajno en Pollando fine de 2017. Al la unua sesio, TEJO sukcesis sendi Katharina Klat. La dua sesio okazis en Tuluzo, Francio kaj por tiu evento krom Katharina Klat, ankaŭ Iwona Kondraciuk trejniĝis nome de TEJO. La lasta trejnada sesio okazos en Slovakio okaze de Somera Esperanto-Studado 2018 kaj por tiu sesio ĉeestos 3 reprezentantoj de TEJO, inkluzive de Julien Becan, Iwona Kondraciuk kaj Szilva Szabolcs.

Konsciinte ke mankas laborforto por la komisiono, la komisiito faris malferman alvokon por varbi kunlaborantojn por la komisiono. Bedaŭrinde, ke ni ne ricevas pozitivan rezulton kaj ĝis nun ni daŭre devas varbi gejunulojn por la komisiono.

Subvenciitoj por KER-ekzamenoj

En 2017 TEJO subtenis 6 membrojn por partopreni en KER-ekzameno por nivelo C1 kaj ĉiuj sukcese trapasis, nome:

Tran Hoan

Ingrid Berglund

Gabriel Oliveira

Emerson Muniz

Alessandro Bonfanti

Frank van Hertrooij

Eksteraj rilatoj

raportas Quentin Weber-Seban, KER-oficisto

La Komisiono por Eksteraj Rilatoj, TEJO-KER, estas tre aktiva komisiono kun pluraj spertaj homoj kiu garantias kontinuecon kaj kompetenton, kune kun diversaj gejunuloj kiuj iom post iom fariĝas pli aktivaj kaj prenas kernan rolon en la komisiono. La agado estas vigla kaj je tutmonda kaj je eŭropa nivelo; estas malpli forta la agado je kontinenta nivelo ekster Eŭropo, malgraŭ streboj pri kiuj estos raportita en ĉi tiu raporto. La ĉefa kialo estas la favoraj socipolitikaj kondiĉoj en Eŭropo kaj ĉefe ene de Eŭropa Unio.

Pro la kreskanta amplekso de la agado de la komisiono estiĝis neformale kunordiganta grupo el la respondeca estrarano, la komisiitoj kaj la TEJO-KER-volontulo. Cetere estis decidita dungi KER-oficiston. En septembro 2017 eklaboris Quentin Weber-Seban por unu jaro. La ĉefaj celoj estas daŭrigi tiun viglan kaj ekster-Esperantie agnoskitan aktivecon, fortigi nian reputacion de fidinda kaj laborkapabla organizo, kaj ĝenerale subteni la volontulan laboron de KER. Antaŭe, la komisiono profitis je la kunlaboro dum la unua duono de la jaro de nia TEJO-volontulo Ana Stretcu. Ŝi multe okupiĝis pri taskoj en la kampo de TEJO-KER. Post komenco de novaj volontuloj en septembro kaj oktobro, kaj Olga Sevcenco kaj Valia Tamvaki transprenis kelkajn KER-rilatajn taskojn.

La “KER-agado” de TEJO enhavas plurajn partojn, laŭ la agadkampoj de nia organizo. TEJO aktivas ĉefe en FoJE (Forumo Junulara Eŭropa), IKRJO (Internacia KunordigRenkontiĝo de Junularaj Organizoj) kaj UNITED (Unuiĝintaj por Interkultura Agado) pri kiuj estos apartaj ĉapitroj sub la gvido de la koncernaj respondeculoj. Pro tio TEJO partoprenis diversajn eventojn, ekzemple forumojn organizitajn de Unesko aŭ la Konsiliojn de Membroj de la Forumo Junulara Eŭropa (FoJE).

TEJO ĉi-jare intensigis sian aktivecon je la nivelo de UN (Unuiĝintaj Nacioj), interalie komencante la proceduron por iĝi agnoskita asocio de UN EKOSOK kaj de UNESKO. Nia aktiveco en tiuj diversaj platformoj ebligas nin defendi lingvajn rajtojn kaj pruvi, ke la lingvo Esperanto estas solvo de internaciaj komunikaddefioj.

Fine, TEJO kandidatiĝis en aŭgusto kaj sukcese iĝis partnero de la 10a Eŭropa Junulara Okazaĵo kaj YO!Fest, kiu okazos en junio 2018 en Strasburgo, Francio. Jam partopreninte plurajn pasintjarajn variantojn, TEJO ĉi-foje ne nur estis parto de la organizo teamo danke al Konstanze Schönfeld (Tuŝka) (helpita de la oficisto Quentin Weber-Seban), sed ĝi ankaŭ ĉefrespondecas pri la “hub: Working Out for a Stronger Europe” (“centro: Prilaboranta cele al pli forta Eŭropo”). La kunlaboro komenciĝis kun la unua pretiga renkontiĝo en Strasburgo, kiun Konstanze kaj Quentin partoprenis en oktobro, kaj ĝi disvolviĝis tra siaj pluraj fazoj tra la fino de jaro ĝis post la fino de la evento mem.

La reputacio de TEJO signife pliboniĝis tra la jaroj kaj ĝi estas ĉiam pli aktiva kaj konata organizo. Multe da homaj kaj financaj rimedoj estos bezonataj por ke TEJO povu almenaŭ gardi ĉi tiun nivelon de aktiveco. Aliflanke, tiu mono iasence revenos, ja nia laboro en Forumo Junulara Eŭropa kaj IKRJO estas menciitaj kiel argumentoj por aljuĝo de administra subvencio.

Forumo Junulara Eŭropa

raportas Quentin Weber-Seban, KER-oficisto

Kadre de Forumo Junulara Eŭropa la agado daŭras kaj intensas.

TEJO estas parto de la reto de *Interŝanĝaj organizoj*, nome internaciaj organizoj sen partia aŭ religia orientiĝo kaj kies ĉefa okupiĝo estas junularaj internaciaj interŝanĝoj. Tiu aparteno donas aliron al pli da maloficialaj informoj kaj komprenoj. Aliflanke, ĝi strebas al plia kaj enhance pli intensa kunlaboro, kaj ĉi-flanke vidas la limojn de tiu grupo por si: efektive, kvankam nepartie, kvankam junularaj interŝanĝoj ludas gravan rolon por ni, TEJO ja havas politikajn sintenon kaj agadon.

Prievente, en aprilo la Membrokonsilion de FoJE en Bruselo partoprenis Walter Bruno kaj Ana Stretcu, kune kun Michael Boris Mandirola por CBMA (vidu ĉi-sube) kaj Oleksandra “Saŝa Murr” Kovjazina kiel membro de la Konsilkonsilio ĉe la Konsilio de Eŭropo. Bedaŭrinde, ŝi ne estis reelektita por nova mandato. Charlotte Scherping kaj Quentin Weber-Seban reprezentis TEJO-n en novembro en la KoMem/Ĝenerala Asembleo de FoJE okazanta en Cascais (Portugalia). Michael Boris same partoprenis la eventon por CBMA.

TEJO en 2017 partoprenis la Yo!Fest, kiu estas memstara evento sendepende de EJO okazanta ĉiun duan jaron. Ana Stretcu, helpata inter alie de Konstanze Schönfeld kaj Alessandro Bonfanti, ĉefrespondecis pri tiu partopreno. Pro la 25a datreveno de la Traktato de Mastro, ĝi okazis en tiu urbo la 7an de februaro. 13 TEJO-anoj partoprenis kaj okazigis bazan kurson de Esperanto kaj lingvopolitikan ludon.

Pluraj TEJO-membroj partoprenis flankajn eventojn kaj trejnadojn dum la dua parto de la jaro: ekzemple Konstanze partoprenis la trejnadon “Boost your advocacy impact” en novembro; pluraj partoprenis en la trejnado dum JES pri eksteraj rilatoj. Legu pli pri la aktiveco de la volontuloj en la raportoj de la volontuloj.

Krome Michael Boris Mandirola prezidas la Konsultorganon pri membrecaj aferoj (CBMA), elektita dum ĝia kunsido en Bruselo en februaro. Tiukadre li studvizitis la 2an fojon la Nacian Junularan Konsilion de Ukrainujo. La posteno donas pli bonan travidon pri FoJE kaj aparte pri la aplikado de la membrokriterioj; krome ĝi ebligas al TEJO havi pli da kontakto kun aliaj organizoj kaj ekscii pli pri ilia interna funkcionmaniero, el kiu TEJO povas ĉerpi bonajn ideojn por si.

Konsilkonsilio

raportas Saša Murr, komisiito

Saša Murr aktiviĝis en “Euro-Arab youth cooperation” kaj pri “No Hate Speech”. Ŝi estis unue anstataŭanto en la Programkomitato de la Konsilkonsilio, poste plenrajta membro. Kiel respondeculo pri Europ-Araba junulara kunlaborado ŝi kunlaboris en la Konsilio de Eŭropo kaj kunlaboris kun la ministerio pri junularo en Maroko. Flanke de Konsilio de Eŭropo, ŝi kunelektis partoprenontojn por la arab-europa kunveno en Maroko, kaj partoprenis en la preparrenkontiĝoj kaj mem estis faciliganto por la trejnado. Ŝi puŝis la agendon de valoroj de la Konsilio de Europro pri genra egaleco, kaj egala reprezentado. Ŝi kontribuis al la programo pri malamparolo kaj internaciaj defioj.

Ŝi aktivis en la kampanjo de Konsilio de Europro pri la kontraŭmalamparol-movado kaj en la elekto de agadtagoj por videbligi la temon. Ŝi partoprenis en kunvenoj pri pluevoluigado de la temo.

En la programkomitato ŝi traktis kaj taksis subvencipetojn, kaj subvencikadrojn. Ŝi estis aktiva en EPLM: European Platform for Learning Mobilities, kaj tie ŝi anstataŭis EFIL-n, “European federation for intercultural learning”.

UNITED

raportas Klára Ertl, komisiito

En aprilo Ana Stretcu kaj Klára Ertl partoprenis la printempan konferencon de UNITED apud Prago, Ĉeĥio, pri la temo radikaliĝo. Somere UNITED okazigis kampanjon por la Tago de la Rifuĝinto, por kiu Klara kiel volontulo de UNITED finpretigis ĝisdatigitan liston de ilia "Mortolisto" kaj skribis kampanjan alvokon. Finsomere Konstanze Schönfeld (Tuŝka) renkontiĝis kun Balint en Budapeŝto por neformala kunsido, dum kiu ili diskutis pri venontaj kunlaboraj paŝoj rilate al partopreno en konferencoj, organizado de UNITED-konferenco mane de TEJO kaj tradukado pere de Esperantistoj. La laboro pri la Mortolisto kontribuis al tio, ke ĝi novembre aperis kiel aldonaĵo en grava Berlina gazeto kaj poste ricevis multan atenton en medioj, kio estis granda sukceso por UNITED. La saman monaton, Konstanze "Tuŝka" Schönfeld kaj Klára Ertl partoprenis en la aŭtuna konferenco de UNITED apud Berlino, pri la

temo malamkrimoj. Por la aŭtuna kampanjo de UNITED kontraŭ faŝismo, TEJO publikigis en Esperanto la alvokon pri ĝi kaj ĝian afiŝkonkurson en sia retejo.

UN kaj IKRJO

raportas Francesco Maurelli kaj Rakoen Maertens

En 2017 TEJO multe agadis ĉe UN. En januaro ĝi partoprenis aktive en la EKOSOC Junulara Forumo, kaj kiel aktiva membro de la Plenumorgano de IKRJO - Internacia KunordigRenkontiĝo de Junularaj Organizaĵoj - kunordigis diskutojn kaj flankajn junularajn kunvenojn. Partoprenis Francesco Maurelli, Sara Spanó kaj Raúl Garcia. TEJO povis alparoli la plensesion kaj interalie prezentis la AEJK-projekton.

En majo TEJO estis reprezentata en la Scienca-Politika Forumo ĉe UN en Novjorko, kaj en junio en la Oceana Konferenco. Dum tiu lasta okazaĵo, Francesco Maurelli povis alparoli la Ĝeneralan Asembleon de UN, kaj interalie ligi la oceanaj temoj al lingvoj kaj kulturoj kiuj estas endanĝerigitaj.

En aŭtuno komenciĝis la pli konkreta laboro de TEJO ene de la IKRJO-plenumorgano por organizi la 2018-an EKOSOK Junularan Forumon. Al tiu celo, Francesco Maurelli dufoje vizitis UN en Novjorko por diskuti la eventon.

Estis abunda la kunlaboro kun WFUNA, kaj en la plenumorgano de IKRJO, en kiu Francesco Maurelli agadis, kaj per la agado de Rakoen Maertens, ekde loka ĝis internacia nivelo. Interalie, Rakoen partoprenis en la fonda kunveno de la Asocio por Eŭropaj Junularaj Organizaĵoj por UN (EUNYA), en Romo, Italio, kie estis eble ankaŭ retumi kun pluraj UN-junularaj delegitoj.

Unesko

raportas Rakoen Maertens

En majo 2017 Rakoen Maertens kaj Oleksandra “Saŝa Murr” Kovyazina partoprenis en Unesko-Forumo en Saŭda Arabio nome de UEA/TEJO. Tie estis eble lerni pri la bona internacia reputacio kiun TEJO havas ĉe internaciaj

NRO-oj, kio impresis la TEJO-reprezentantojn. Dum IJK en Togolando, Rakoen iĝis Komisiito de TEJO pri Unesko. Novembre kaj decembre li partoprenis en pluraj konferencoj pri Unesko, kiel:

- Ĝenerala Konferenco
- NRO Forumo pri Klimatŝanĝiĝo
- Aranĝo organizita de UEA ĉe Unesko pri Zamenhof

La plej grava estis la Ĝenerala Konferenco, kiu similas al la Ĝenerala Asembleo de UN, sed ne okazas ĉiujare. Dum tiu ĉi aranĝo, Rakoen havis la ŝancon alparoli la plenan sesion la 6an de novembro.¹ Rilatoj kun UNESKO-komisionoj kaj UNESKO Asocioj plifortiĝis.

Talento

raportas Charlotte Scherping Larsson, respondeca estrarano

La komisiono pri Talento estas sen komisiito, tial estrarano Charlotte Scherping Larsson okupiĝas pri ĝi. La nomo de la komisiono estis ŝanĝita de Homaj Rimedoj por pli bone montri kiel aktivuloj estas vidataj en la organizo. La prelego “TEJO-sinprezentas” estis prezentita dum JES. Charlotte bonvenigis novajn volontulojn kaj intervjuis la volontulojn, kiuj finis sian volontuladon. Post la komenco de la mandato ĝis la fino de 2017, Charlotte kunsidis kun la volontuloj en Roterdamo pli-malpli ĉiusemajne. Post iom da tempo evidentiĝis ke necesas pli bona komunikado kun la Ĝenerala Direktoro Veronika Poor, kaj regulaj ĉiusemajnaj kunsidoj estis aranĝitaj por trakti temojn rilate al la Centra Oficejo kaj rilate al la volontuloj. Charlotte kreis [enkondukan dokumenton](#) por novaj volontuloj kaj ĝisdatigis la manlibron por volontuloj, por forigi terurajn, malnovajn tekstojn de ĝi.

Kulturo

raportas Charlotte Scherping Larsson, provizore respondeca estrarano

¹ Kontakto: https://drive.google.com/open?id=1xJ0IDnfl5IE43RUjUZcVX3V5EfzkyXdI0u_m5Cx6
 Revuo Esperanto: https://drive.google.com/file/d/18j_-7weZ7DqtvD6vmcNFWWOo79riDpaw
 Video de Prelegeto dum Malferma Tago: <https://www.youtube.com/watch?v=C3Bh-bFMRWY>

Danke al la iniciato de Adrián Alejandro, komisiito pri kulturo, la listo “Kulturaĵoj rete haveblaj” <http://bit.ly/kulturajhoj> estis ĝisdatigita.

Ankaŭ al lia laboro ŝuldiĝas la subtitoligo de filmo pri Esperanto al la hispana lingvo, por informi pri Esperanto en hispan-parolantaj landoj, kiel Argentino - <https://www.plenarondo.com/>.

Dum la Universala Kongreso daŭris la kunlaboro kun UEA, kaj aparte pri la Oratora Konkurso, dediĉita al junuloj.

La Esperanta Selektitaro - en kiu anas ĉefe junuloj - venkis la unuan futbalmatĉon en la historio de la internacia UK-a Esperanta futbalo.

Volontulo de TEJO, Fériel Djenidi, kune kun volontulo de UEA, Roxanne Romann, prilaboris sian personan artan projekton kune, kaj ekspoziciis ĝin en Berlino.

Kongresoj

Raportas Feliĉa, respondeca estrarano, Łukasz Żebrowski, oficisto pri Landa Agado

IJK 2017

La 73-a IJK – Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazis de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2017 en Aneho, Togolando kun temo “Virinoj kaj viroj kun siaj kulturoj”. Ĝis la jaro 2009 la IJK-oj estis organizataj ĉefe en Eŭropo (proksimume 2 el ĉiuj 3) kaj kutime fare de fortaj landaj sekcioj. La kongresoj estis ĝenerale sukcesaj. La politiko de TEJO pri kongresoj ŝanĝiĝis post 2009. TEJO-estraro ekhavis la strategian celon iam realigi IJK-on en Afriko kaj ankaŭ ekhavis klaran tujan celon igi IJK-ojn pli tutmondaj. Finfine en 2017 TEJO sukcesis realigi la celon kun la unua IJK en Afriko.

Ĉi tiu IJK estis aparta pro la AEJK projekto kaj pro la donackampanjo kiu ebligis venigon de multaj afrikaj kaj eŭropaj gejunuloj al la kongreso. Partoprenis en la kongreso 111 esperantistoj de multaj landoj (32 esperantistoj el A-landoj, 23 esperantistoj el B-landoj kaj 56 esperantistoj el C-landoj), el tiuj 7 esperantistoj malpli ol 20-jara, 90 esperantistoj de 20- ĝis 35-jara kaj 14

esperantistoj pli ol 35-jara. Dum la tuta semajno de la kongreso, ni multe esploris la kongresan temon per prelegoj, diskutrondoj, trejnadoj, kaj aliaj programeroj. Nia celo dum IJK estis ĝuste kundividi niajn kulturojn unuj kun la aliaj – ni lernu pri kulturoj de aliuloj, sed samtempe ni ekhavu novajn perspektivojn ankaŭ pri niaj propraj, kaj primeditu la procedojn per kiuj kulturoj ĝenerale funkcias. Rezulte, ni povos forĝi fortajn aliancojn surbaze de niaj komunaĵoj kaj malsamecoj, por kune krei mondon en kiu ni ĉiuj povas prosperi.

Krome, organizado de la ĉi-jara IJK okazis eskterordinara kun kvarontempa oficisto respondeca pri la okazigo de la kongreso. Pro manko en sperto de LKK, en la lastaj 4 monatoj de 2016 Łukasz Żebrowski estis dungita kiel oficisto de TEJO kunrespondeca pri merkatico kaj, pli specife, inter liaj ĉefaj taskoj estis organizi donackampanjon por la afrika IJK. Kun multaj spertoj en organizado de IJK, nia oficisto pretigis buĝeton kaj helpis en la organizado de la kongreso, kiu fine havas pozitivan financon rezulton.

La financa kalkulo de IJK estas interligita kun la AEJK-projekto kaj ĝis la fina pritakso de la projekto ne eblas prezenti finajn datumojn.

IJK 2018

La 74a IJK de TEJO okazos en la urbo Badajoz (Hispanio), ĉe la landlimo kun Portugalio, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2018. Kunorganizas la Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS) kaj la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ). La temo de la IJK estas “Genro kaj egaleco”.

Dum la IJK okazos ankaŭ trejnado kadre de la Erasmus+ projekto Florigu Egalecon inter Junuloj (FEJ)! La temo de la trejnado estas egaleco kaj per tio ni komprenigas, inter aliaj aferoj, pluranecon, stereotipojn, antaŭjuĝojn, kontraŭ-diskriminacian agadon, alireblecon kaj egalrajtojn.

Landa Agado

raportas Enric Baltasar, respondeca estrarano, Łukasz Żebrowski, oficisto pri Landa Agado

KODEJO

Komence de la jaro estis realigita ĉiujara demandaro KODEJO kaj ĝiabaze estis pretigita raporto pri la junulara movado. Ĉi-jare KODEJO estis signife ŝanĝita por doni ankoraŭ pli larĝan bidon pri la movado kaj fokusiĝo pri kiel TEJO povas esti utila. Plenigado estis ebligita ankaŭ al referencpunktoj (reprezentantoj de landoj sen organizo) kaj al nejunularaj fakaj asocioj kiuj nun fondas junularan sekcion (aŭ nur pripensas tion). Interalie danke al tio alvenis datumoj el 60 landoj kaj 6 fakaj asocioj. Estis krome kreita funelo pri Landa Agado por kompreni diversajn situaciojn kaj scii kiel agi en ĉiu.

IJK: partoprenigo de afrikanoj, trejnado, donaco de libroj

Agado rilate al Afriko estis aparte grava dum 2017 lige kun IJK okazanta en Togolando. Danke al tre sukcesa donackampanjo, sukcesis partoprenigo de afrikanoj en IJK. La kongreson ĉeestis 52 afrikanoj el 10 afrikaj landoj. Espereble la sperto, kiun ili ricevis tie helpos aktivigi novajn organizojn sur la kontinento.

Dum la kongreso okazis pluraj trejnadoj el kiuj eblis multon profiti. Okazis ankaŭ trejnado specife pri Landa Agado farita de Enric Baltasar, Léon Kamenický kaj Tomáš Stano.

Antaŭ la kongreso okazis kampanjo por sendi librojn al LS-j en Afriko. Kolektitaj libroj estis distribuitaj dum la kongreso.

Novaj kaj reaktiviĝintaj Landaj Sekcioj

Ekestis traktata aliĝpeto de Tanzania Esperanto-Junularo (TEJ) kaj Senegala Esperanto-Junularo (SEJ), sed la procezo ankoraŭ ne atingis la finon.

Sian agadon reaktivigis Usona Esperantista Junularo (USEJ).

Estis kreita paĝo kun aliĝinformoj kaj formularo por plifaciligi kaj plirapidigi la

aliĝprocedon, kiu ja estas peza tasko por ne tiom spertaj aktivuloj.

Modeloj de statuto aŭ regularo por sekcioj de TEJO

Pro pensado pri novaj Landaj kaj Fakaj Sekcioj de TEJO oni kreis kaj aktualigis modelojn de statuto aŭ regularo por sekcio de TEJO. Ĉeokaze estis pretigita kompilo pri celoj de Landaj kaj Fakaj Sekcioj de TEJO. Sume la dokumentoj celas subteni aktivulojn kreantaj novajn organizojn, en iliaj unuaj, ne facilaj paŝoj.

Serĉado de partneroj por projektoj

Estis trovitaj pli ol sufiĉe da partneroj eŭropa-amerika projekto kaj por projekto pri organiza disvolviĝo. La unua el la projektoj finfine ne estis forsendita (ne estis sufiĉe preta ĝis la limdato), la dua estis forsendita sed ne akceptita je tiu provo. Krom tio, estis organizitaj pli da projektoj ol en la pasintaj jaroj.

Kreo de la Aktivula Akademio

La Akademio estis kretita sub la retejo de TEJO <https://akademio.tejo.org/>, danke al projekto kunlabore kun pluraj landaj sekcioj. Tie troviĝas abundaj materialoj kiuj rezultas de la trejnadaj pri diversaj temoj okazigitaj de la organizo kaj kiujn la vasta publiko povus reuzi laŭbezzone por trejnado aŭ trejniĝo.

Esperanto-standoj

Estis grandparte preparita gvidilo pri organizado de Esperanto-standoj. La dokumento celas kolekti ideojn, materialojn, konsilojn kaj anekdotojn rilate al Esperanto-standoj por plifaciligi al aktivuloj starigi efikajn kaj allogajn standojn. Ĝi ankoraŭ ne estis publikigita.

Novaj komisiitoj

En 2017 estis nomumitaj du novaj komisiitoj: Joanne Johns el Aŭstralio por Oceania Komisiono kaj Juliana Evandro el Brazilo por Amerika komisiono. Per tiom da komisiitoj kiom estas kontinentoj TEJO plenumis celon de sia strategia plano. Aparte estis nomumita vickomisiito de la afrika komisiono Man Aimé-Patrick.

Strategia planado

La komisiono pretigis proponaron por la nova strategio traktata fine de la jaro, kaj ankaŭ okazis malferma strategia sesiaro dum IJK. La proponoj eniris la Strategian Planon 2018-2020.

Duolingo-kursfinintoj

Estis sendita senpaga revuo al 79 kursfinintoj.

Ekokazis kreo de datumbazo pri kursfinintoj kaj trasendo de mesaĝoj al landaj sekcioj pri ilia ekzisto (kun ilia permeso).

TEJO-membroj

Okazis interkonsento por kontaktablo de TEJO-membroj flanke de la komisiitoj.

Trejnadoj pri merkatio

En Belgio kaj Hispanio okazis trejnadoj pri merkatio pritraktantaj interalie organizadon de kampanjoj kaj argumentadon.

Mentora programo

Estis antaŭenirigita la projekto de kreo de mentora programo.

Jura registriĝo

Estis estrara decido subteni asociojn por ilia jura registriĝo.

Esperanto-aranĝoj

Kiel ĉiujare, estis aktualigita dokumento pri Esperanto-aranĝoj okazantaj de junio ĝis septembro, por eviti kolizion de datoj.

Merkatio

raportas Charlotte Scherping Larsson, provizore respondeca estrarano

Dum la jaro okazis varbado dum EYE2017, pri kio vi povas legi pli en la KER-parto de la raporto. Fériel Djenidi (volontulino) kreis novan flugfolion (Dezajno, presado, tranĉado, faldado). Niyukuri Gilbert (Volontulo) elsendis pri Esperanto (nacilingve) unufoje semajne, ĉe Gift Radio en Burundo. Enric Baltasar (estrarano) en marto organizis trejnadon kun Michae pri merkatio kaj kiel vendi ideojn en Belgio kadre de la projekto ECY, en majo li prezentis finstudan projekton pri reta disvastigado de Esperanto fokuse pri asocioj, junio li okazigis kun Léon trejnadon pri organizado de kampanjoj kaj komunikkanaloj kadre de la projekto ECY (alekstera komunikado), septembre li prilaboris kun Fatma Eroĝlan kaj Michael Boris Mandirola la intelektajn produktojn de ECY kaj propran retejeton: <http://trejnadskatolo.tejo.org> (aperontaj en la Akademio) kaj partoprenis la lastan eventon de ECY en Slovakio, kie prezentiĝis la rezultoj al ekstera publiko kaj al Esperantistoj. Tie ili ankaŭ gustumigis la enhavon de la produktoj.

Dum JES 2017-2018 la volontuloj Paul Helly, Valia Tamvaki kaj Niyukuri Gilbert helpis starigi TEJO-budon (libera disdono de Kontakto, aliĝoj al TEJO, ĝeneralaj informoj pri TEJO), ĉeestis trejnadon pri KER, partoprenis prelegon kun Charlotte (Estrarano) "TEJO sinprezentas". Ana Strecu (volontulino)

fintradukis la retejon esperanto.net en la rumanan.

Movada Rubriko

Raportas Massimo Ripani, redaktoro de Movada Rubriko

Komence de 2017, oni decidis ŝanĝi la nomon de la rubriko “TEJO-tutmonde” al "Movada Rubriko”. TEJO-tutmonde daŭre aperas ene de la revuo "Esperanto" kaj, sub la nomo "Movada Rubriko", ene de la revuo Kontakto. En Kontakto 2017:6 ĝi havis pli da ol la kutimaj 4 paĝoj por raportoj pli profunde pri la projekto de Afrika Eŭropa Junulara Kapabligo kaj pri la unua Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Afriko.

Kontakto

raportas Rogener Pavinski, redaktoro de Kontakto

En 2017 la redakta laboro de Kontakto fluis en bona kaj konstanta laboro. Danke al klopodoj de la antaŭa Ĝenerala Direktoro, Veronika Póor, por la unua fojo en la pli ol 50-jara historio, nia revuo estas presita plenkolore. Tio donis alian aspekton al la presitaj numeroj, kiuj iĝis pli belaj. Krom la kovrilo, kiu ricevis etajn novajn plibonigojn, la cetero de la revuo sekvas pli-malpli la saman aspekton kaj la kutiman enhavon.

La 6 numeroj aperis sufiĉe akurate, sen grandaj malfruoj.

La korektado kaj provlegado ŝuldiĝas al la teknika helpo de la TEJO-voluntuloj kaj al la eks-oficisto Rob Moerbeek. La Movada Rubriko estis prizorgata de Massimo Ripani. Ni tenis la konstantajn rubrikojn (La Blaga Blogoj, Tiel la Mondo, Kontaktek, Recenzoj).

La unua numero (277) prezentis intervjuon kun la kantisto Jonny M. kiu aperis surkovrile. La numeroj 278, 279 kaj 282 prezentis intervjuojn kun la gastoj Eric Languilat, Chuck Smith, kaj Michael Boris Mandirola respektive.

La ĉefartikoloj traktis kiel ĉeftemojn “Genra Egaleco” (n-ro 278); “Mono. Ĉu Neŭtrala Lingvo?” (n-roj 279 k 280); “Veganismo” (n-ro 281) kaj la lasta numero de la jaro (n-ro 282) estis speciala pri la okazigo de la historia unua Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Afriko, kunredaktita de Pierre Vittet.

Pri statistikoj pri membroj UEA havas la nombrojn. Tamen de 3 aŭ 4 jaroj ne okazas abono-kampanjo aŭ strategio nek de TEJO nek de UEA por altigi la nombrojn de abonantoj. Laŭ mi nepras tiaj kampanjoj dum la kongresoj kaj fine aŭ komence de la jaro.

En la reto okazis kreskoj: nia retejo estas konstante aktualigata kaj kreskas la atingo de niaj profiloj en la reto (Facebook-ŝatoj: de 1.551 (2016) al 1724; Twitter-sekvantoj: de 1383 (2016) al 1679. Post tri sinsekvaj Muzikaj Konkursoj, mi decidis ne plu ĝin organizi pro manko de efektiva apogo.

TEJO-aktuale

raportas Charlotte Scherping Larsson

La januaran TEJO-aktuale redaktis Petro Baláž, oficisto ĝis decembro 2016. Poste ĝis junio redaktis ĝin Alessandro Bonfanti, julion kaj septembron Ana Stretcu. Nuntempe volontuloj de TEJO okupiĝas pri la redaktado kaj dissendado de TA.

Pasporta Servo

raportas Charlotte Scherping Larsson, ekde februaro 2018 respondeca estrarano

En 2017, Besenyei Eszter “Stela” kaj Baptiste Darthenay zorgis pri Pasporta Servo kaj grande sukcesis pri la eldono de la libro. Post la decido en 2016 vendi la libron, tiel ĝi estis vendata en 2017. Dum IJK estis laborgrupo pri Pasporta Servo, sed ĝin ĉeestis ĉefe komitatanoj, kiuj mem ne laboris en la teamo. Mallonge post la IJK, Stela demisiis kiel komisiito. Dum KKPS en Nederlando estis kunsido inter kelkaj aktivuloj pri la daŭrigo de Pasporta Servo. Meiyer Goren daŭre aktivas kiel programisto. Paul Helly, volontulo de TEJO en

Roterdamo, estis aktiva en la projekto, respondis al retmesaĝoj kaj komencis lerni pri programado en la sistemo. Por Pasporta Servo necesas aktiva longperspektiva komisiito kaj kunlaboro kun la ĉefa teamo, kiu laboras por ĝi - Christine Brückner, Lars Sözüer, Baptiste Darthenay, aldone al aliaj aktivuloj.

Scienca kaj faka agado

raportas Konstanze Schönfeld (Tuŝka) kaj Rakoen Maertens

En 2017 estis denove scienca prelegsesio, pri kio okupiĝis Rakoen Martens, anstataŭante la komisiiton pri SFA Olga Shiliaeva. La prelegantoj (iliaj temoj aperas en krampoj) estis Véronique Bichon (*Ĉiu infano fariĝu genio*), Matthieu Desplantes (*Homeopatio: kio ĝi estas?*), Olympe Agbangl (*Ligiloj inter dietoj kaj la klimata varmiĝo*), Kubof Hromoslav (*Vikimedia*) kaj Charlotte Scherping Larsson (*Psikologiaj esploroj pri seksperfortaj mitoj*).

Komunikado

raportas Ariel Palmer, oficisto pri komunikado

Mi eklaboris por TEJO en januaro de 2017 kaj mi komence verkis proponon por nova komunika strategio por la organizo.

Celoj de la komunikado

La ĉefaj longtempaj celoj, laŭ mia projekto, estas pliprofesiigi la komunikadon de TEJO, plibonigi la konscion de TEJO inter ĝiaj membroj, plibonigi la sintenon al la organizo, kaj ankaŭ ke la sociaj retejoj de TEJO povu iĝi centro de diskutoj kaj ejoj kie oni subtenas debatojn kaj valorigas la interesojn, opiniojn kaj voĉojn de la esperantistoj.

Atingoj

Dum 2017 interagoj kreskis multege en ĉiuj sociaj retejoj, homoj komentis ofte, kunhavigis afiŝojn, kaj diskutis pri diversaj temoj. Krome, alvokoj atingis multe pli da homoj ol antaŭe kaj tial ni ricevis multe pli da kandidatiĝoj por postenoj,

volontulado kaj ĝenerale por partopreno en TEJO-aktivaĵoj.

Danke al la novaj enhavoj kaj disvolviĝo de komunikado, dum 2017 ni gajnis pli ol 1000 novajn sekvantojn en Facebook (estis 2700 komence de januaro kaj fine de decembro ili estis 3753, bonega rezulto se oni taksas ke ni entute ne reklamis la paĝon per pagitaj afiŝoj de Facebook).

En Twitter ni gajnis pli ol 500 sekvantojn dum la jaro kaj la interagoj tie multe pligrandiĝis.

En Instagram ni ankaŭ gajnis pli ol 500 novajn sekvantojn.

Enhavoj kaj agado

Por engaĝi la komunumon mi komencis krei diversspecajn enhavojn, kiujn mi publikigis en la sociaj retejoj de TEJO (Facebook, Twitter, Instagram, VK) kaj en la retejo tejo.org

Unuflanke, mi komencis aktive kunhavigi kaj helpi disvastigi enhavojn jam kreitajn de homoj en la Esperanto-komunumo, kaj aliflanke mi fokusiĝis pri kreado de novaj enhavoj (citaĵo-bildoj, gramatikaĵoj, starigo de demandoj kaj diskutoj, ktp.). Ekzemple la pli ol 100 citaĵo-bildoj kiujn mi kreis kaj publikigis dum la jaro, kvankam foje nerilataj al Esperanto (sed kompreneble ĉiam en Esperanto), helpis atingi rekordan nombron de homoj kaj instigis plurajn diskutojn ĉe nia Facebook paĝo pri pluraj diversaj temoj. Mi interagis kun uzantoj en sociaj retejoj, respondis al demandoj, kuraĝigis homojn partopreni en la aktivaĵoj de TEJO.

Mi kreis alvokojn kaj artikolojn en tejo.org kaj aldonis paĝojn kaj informojn por eventoj en la tuta mondo kaj helpis varbi ilin.

Mi faris 7 intervjuojn (tekstaj/voĉaj) al esperantistoj pri diversaj temoj (muziko, arto, GLAT-aj aferoj, ktp.) kiujn mi disvastigis interrete. Mi komence planis fari multe pli da intervjuoj, sed bedaŭrinde ne sukcesis. Mi esperas ke estontece mi sukcesos komenci denove la projekton aŭ ke alia homo transprenos ĝin, ĉar mi kredas, ke vere gravas intervjui esperantistojn, paroli pri ilia agado kaj starigi diskutojn pri interesaj temoj.

Mi faris fotojn dum Esperantaj renkontiĝoj. Fotoj helpis porti bonan trafikon, engaĝiĝon kaj interagojn al niaj paĝoj.

Inter la celoj de la organizo por 2017 estis la plano komuniki pli bone kiel TEJO funkcias, montrante ankaŭ la homan dimension de la organizo. Tial mi realigis videojn de komitatkunsido kun intervjuoj al la estraranoj (la video estis vidita

pli ol 2500 fojojn kaj instigis plurajn reagojn).

Dum la jaro mi ankaŭ kolektis plurajn ideojn kaj spertojn pri kio funkcias kaj kio ne tiom bone funkcias en komunikado.

Grafikaj laboroj

Dum 2017 mi prizorgis plurajn grafikajn laborojn por TEJO. Mi kreis plurajn ŝablonojn por soc-retaj afiŝoj, mi kreis grafikaĵojn por la retejo (ĉefe bildoj por artikoloj, alvokoj, intervjuoj, oficialaj komunikoj, raportoj, ktp.). Post la unuaj monatoj mi renovigis iom post iom la bazan vidan identecon de TEJO. Mi kreis logoojn por TEJO Akademio kaj TEJO Aktuale, mi kreis komunikan identecon por IJK 2018 en Badajoz kaj oficialan logoon kaj stilon por la evento.

Mi kreis grafikaĵojn por aldonaj komunikoj pri IJK en Togolando kaj ankaŭ por aldona kampanjo por monkolekto, por la konkurso “Partoprenu IJK-n” kaj por aliaj alvokoj, artikoloj, kaj reklamoj; por nomŝildoj por la partoprenantoj (la identeco kaj la belega oficiala logoo estis jam faritaj de la antaŭe dungita grafikisto Przemysław Wierzbowski, mi simple adaptis la stilon al novaj komunikaĵoj).

Mi elpensis kaj kreis TEJO-flugfoliojn por festivaloj kaj adaptis ilin al pluraj lingvoj.

Kadre de la celo ke TEJO iĝu platformo por la junulara movado, ni komencis disponigi profesion komunikan helpon por landaj sekcioj (varbado por eventoj, helpo por grafikaĵoj, logooj, flugfolioj, ktp.)

Videoj

Mi kreis videon por Zamenhofa Tago kun kontribuoj de pluraj homoj (la video havas pli ol sep mil vidojn kaj centojn da kunhavigoj). Mi kreis videon dum IJF en Castione della Presolana, kiu montris la festivalan etoson kaj la viklecon de junaj esperantistoj. La itala televida kanalo RAI 3 elsendis la videon en nacia programo; multege da homoj spektis ĝin.

Mi intervjuis plurajn homojn por la video-projekto “The World of Esperanto”, publikigota en 2018.

Kunlaboro kun la estraro

La tiama prezidanto Michael Boris Mandirola kaj la respondeculo pri merkatico (kaj poste prezidanto) Enric Baltasar, havis gravegan rolon en la progreso kaj bonaj atingoj de la komunikado en la organizo. Ili kunagadis por renovigi kaj pliprofesiigi la organizon kaj kreis bonan merkatican direkton. Samtempe ili donis al mi grandan liberecon sekvi miajn komunikajn ideojn kaj intuiciojn kaj eksperimenti kun novaj enhavoj, kaj tio estas vere grava por rapide ŝanĝiganta fako kiel komunikado.

La sekvaj estraranoj, ĉefe Konstanze Schönfeld kaj Charlotte Scherping, kun kiuj mi havis kaj havas pli oftan kontakton rilate al komunikado, daŭre donis gravan kontribuon al la disvolviĝo de komunikado, kun granda fleksebleco kaj malfermeco.

Stabo, EVS, administra subvencio

raportas Mounir Abjiou, oficisto

Dum la unuaj du monatoj de 2017, mia ĉefa okupo estis raporti pri la administra subvencio de la jaro 2016, tio konsistis el vortuma raporto, kunigo de dokumentoj kaj administra tradukado de diversaj pruviloj de Esperanto al la angla por EACEA. La raporto estis fine sukcesa kaj ni ricevis post monatoj la lastan 20% de la subvencio. Paralele, mi varbis volontulojn por la februara limdato de EVS, kiun mi subvencipetis dum mi traktadis la administran raporton. Post monatoj, ni ricevis pozitivan novaĵon pri akceptado de du volontuloj. Komence de marto, mi prizorgis la kapablokonstruan projekton inter Eŭropo kaj Ameriko, sed pro diversaj kunordigaj kialoj, plejparte lastmomentaj, la subvencipeto ne atingis sukcesan rezulton. Tuje, mi raportis sukcese pri antaŭa volontula projekto kaj ekstraktis subvencipeton tra EJK ĝis la fino de marto kies rezulto estis negativa pro parte la tiama neklareco de la 2018-a laborplano. Paralele, mi kolektis kaj metis la materialon de ETEY en la portalon de Erasmus+, kies rezulton ni ricevis printempe kaj kies finajn kostojn finkalkulis somere. En aprilo, inter pluraj administraj taskoj kaj varbado de volontuloj, mi prizorgis alian EVS-subvencipeton, kiu sukcesis je unu volontulo. En julio mi ekstraktis akreditpetojn por volontulejoj ekster

Roterdamo, kies fintraktadon mi finis fine de la jaro pro diversaj prioritatoj. Septembre, dum ekpretigo de EJF-sbvencipeto kiu finfine ne estis forsendita, mi sbvencipetis por tri EVS-volontuloj, kies rezulto estis pozitiva. Paralele, mi raportis pozitive pri du pasintaj EVS-projektoj kaj tuje ekstraktis la administran sbvencipeton ĝis mezdecembre por la jaro 2018.

Sociaj retejoj

Raportas Francesco Maurelli, surbaze de la komitataj cirkuleroj

En 2017 la unuan fojon TEJO dungis komunikiston, Ariel Palmer, por prizorgi kaj pliprofesiigi ĝian publikan bildon.

Komence de la jaro, la Facebook-paĝo de TEJO havis 2 774 sekvantojn, kompare kun 3 753 fine de la jaro, neta gajno je preskaŭ mil sekvantoj.

Komence de la jaro, la TEJO-konto ĉe Twitter havis 1 228 sekvantojn, kompare kun 1 745 fine de la jaro, neta gajno je pli ol 500 sekvantoj.

Komence de la jaro, la TEJO-konto ĉe Instagram havis 151 sekvantojn, kompare kun 652 fine de la jaro, neta gajno je pli ol 500 sekvantoj.

Dum la jaro ankaŭ estis kreita konto ĉe VK, kun 69 sekvantoj fine de la jaro.

Volontuloj

La TEJO-volontuloj okupiĝas pri la ĉiutaga oficeja administrado kaj pri la kontaktoj ene kaj ekstere de la organizo. Tio inkluzivas la pritraktadon de la poŝto, papera kaj reta, telefono, Skajpo, ktp kaj la respondadon al la demandoj kaj petoj de la membroj, aktivuloj kaj eksteruloj. La volontuloj respondecas ankaŭ pri la komunikoj pere de la Facebook- kaj Twitter-kontoj de TEJO, kaj parte pri la publikigado de la novaĵoj en tejo.org. Krome, ili ofte kunordigas la laboron de estraranoj, komisiitoj kaj aliaj aktivuloj, plifaciligante la komunikadon inter ili, memorigante taskojn kaj limdatojn, kaj ankaŭ estante la ĉefa kontaktpunkto kun la CO en Roterdamo. Dum la fizikaj kaj retaj kunsidoj volontulo verkas la protokolojn kaj la taskolistojn. Koncerne la rilatojn inter la landaj sekcioj kaj TEJO, la volontuloj partoprenas en la kolektado de informoj por la enketo KODEJO. La respondojn al tiu ĉi enketo oni uzas por ĝisdatigi la

informojn pri TEJO kaj ĝiaj LS-oj aperontajn en la Jarlibro de UEA. La volontulo partoprenas en la vivo de la Centra Oficejo de UEA kaj de tempo al tempo helpas pri komunaj taskoj. Ekzemple volontuloj regule voĉlegas artikolojn de la revuo Esperanto por dissendo al blinduloj. Sekvas pli detala prezento de la individua laboro.

Olga Sevcenco

Mi sendis tekston pri junularaj rajtoj al OHCHR, la Oficejo de la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj (Unuiĝintaj Nacioj); mi laboris pri la nova strategio, mi sendis petskribon por esti membro de ICMYO, la Internacia kunordigo de junularaj organizoj dum la jaroj 2018 - 2019; Mi sendis raporton kun rekomendoj pri Universala Perioda Revizio. TEJO en kunlaboro kun sia membra organizaĵo SKEJ kaj Eŭropa Junulara Forumo prezentis raporton kiel parton de la Universala Perioda-Revizio de la UN-Konsilio pri Homaj Rajtoj en Slovakujo. La Universala Perioda Revizio estas procedo, kiu enhavas la revizion de registraĵoj pri homaj rajtoj de la membroŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj. TEJO kune kun la Eŭropa Junulara Forumo prezentis rekomendojn pri ĉefe kvar temoj: diskriminacio kontraŭ romaoj, ekzistantaj antaŭjuĝoj kontraŭ etnaj minoritatoj, lingvaj rajtoj kaj partoprenado en politikaj procezoj. Mi kontribuis al la Regiona Konsultado de la UN-Oficejo de la Alta Komisiono pri Homaj Rajtoj kaj la Eŭropa Junulara Forumo pri Junularo kaj Homaj Rajtoj. Aferoj rilataj al registrado kaj malregistrado de volontuloj; Mi partoprenis en publika konsultado ĉe Eŭropa Parlamento rilate al la Erasmus+ buĝeto. Mi sendis rekomendon pri nova EU-Junulara Strategio kaj respondecis pri la kaso en la oficejo.

Valia Tamvaki

Mi partoprenis la AMO-seminario en Bruselo por KER. Mi starigis budon dum JES. Mi ankaŭ helpis Lukasz kaj aliajn organizi dokumentojn por AEJK-partoprenantoj por JES kaj skanis kaj organizis dokumentojn por AEJK. Mi partoprenis en JES per KER-trejnadoj kaj starigo de TEJO-budo. Tradukis (kaj tradukos) retpaĝojn en la Grekan. Komencis lerni pri la agado por UNITED. Mi subtenis la estraron en la farenadoj rilate al la apartamento.

Paul Helly

Komencis la volontuladon la 24an de septembro, por unu jaro, kaj inter la tri volontuloj respondecis plejmulte pri teknikaj kaj komputilaj taskoj. Jen la aktivaĵoj ĝis la 31-a de decembro 2017: Bonvenigo de Valia, nova volontulo; Ĝisdatigo de retpaĝaro: tradukoj (al la france kaj al la angla), korektoj, instalo de novaj kromprogrametoj; Respondeco pri subdomajnoj kaj plusend-retadresoj; Traktado de retmesaĝoj de retpoŝtkatolo; Helpo al traktado de voĉlegado por blinduloj: voĉlegado de artikoloj kaj ordigo de sondosieroj; Aldonis novan funkcion al voĉdonsistemo de la komitato de UEA (sama sistemo kiun TEJO uzas, eventuale mi povus ankaŭ ĝisdatigi tiun de TEJO); Partopreno al KKPS: starigo de TEJO-budo, partopreno al teamo de PS; Partopreno al JES: protokolo dum komitatkunsidoj, partopreno al KER-trejnadoj, starigo de TEJO-budo.

Gilbert Niyukuri

Mi aranĝis radiointervjuojn kaj organizis elsendojn por loka radio ĉiusemajne, cetere mi ankaŭ partoprenis en JES kaj starigis la TEJO-budon kaj la programeron “TEJO prezentas sin”.

Mallongigoj de personaj nomoj

Ariel	Giorgio Nikolov
Charlotte	Charlotte Scherping Larsson
Feliĉa	Mung Bui
Ĝojo	Hoan Tran
KuboF	Michal Matúšov
Tuŝka	Konstanze Schönfeld

Mallongigoj

AC	Advisory Council <i>(KonsilKonsilio pri Junularo de Konsilio de Eŭropo)</i>
AEGEE	Association des Etats Généraux des Etudiants de l'Europe <i>(Eŭropa Studenta Forumo)</i>
AEJK	Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo
AKE	Afrika Kongreso de Esperanto
AL	Araba Ligo
AT	Aktivula Trejnado
BEST	Board of European Students of Technology <i>(Eŭropa Konsilio de Teknologiaj Studentoj)</i>
CO	Centra Oficejo de UEA/TEJO (Roterdamo)
COP22	Klimatkonferenco de la Unuiĝintaj Nacioj de 2016
DEAR	Development Education and Awareness Raising
EACEA	Education, Audiovisual and Culture Executive Agency <i>(Eduka, Aŭdvida kaj Kultura Plenuma Agentejo)</i> de EU

ECAS	Eŭropa CivitanAgada Servo
ECY	Effective Communication for Youth (<i>Efika komunikado</i>)
EJF	Eŭropa Junulara Fonduso
EJO	Eŭropa Junulara Okazaĵo
EKOSOK	EKOnomia kaj SOcia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj
EPLM	European Platform for Learning Mobility
ETey	Empower Trainers, Empower Youth (<i>Trejnado por trejnistoj</i>)
EU	Eŭropa Unio
EVS	Eŭropa Volontula Servo
FEJ	Filipina Esperanto-Junularo
FLOM	Fortoj-Lamaĵoj-Oportunoj-Minacoj
FoJE	Forumo Junulara Eŭropa
FTP	File Transfer Protocol (<i>DosierTransdona Protokolo</i>)
IJF	Internacia Junulara Festivalo
IJK	Internacia Junulara Kongreso
IKRJO	Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj
ILEI	Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj
ISAE	Internacia Scienca Asocio Esperanta
JES	Junulara Esperanto-Semajno
JOTE	Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj

KAEST	Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko
KdE	Konsilio de Eŭropo
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
KKPS	KlaĉKunveno PostSomera
KODEJO	KOMpleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizo
LA	Landa Asocio
LKK	Landa Kongresa Komitato
NA	Nacia Agentejo
NROj	NeRegistaraj Organizo
SFA	Sciencaj kaj Faka Agado
TA	TEJO Aktuale
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TT	TEJO Tutmonde
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso
<i>UNITED</i>	Unuiĝintaj por Interkultura Agado
WOSM	World Organization of the Scout Movement (<i>Monda Organizo de la Skolta Movado</i>)

Suplementoj

Suplemento 1

Demisiletero de Enric Baltasar

Estimataj aktivuloj,

Preter homoj ni estas konstruantoj, kaj estas inspirige por mi esti kun homoj kiuj tiom sin dediĉas al nia komuna mondotransformiga celo. Estas pro tio ke mi sentas la bezonon danki ĉiujn kiuj plenigas per revoj la mondon, ĉiujn kun kiuj mi kunbatalis kaj ĉiujn kiuj kredis je mi.

Por Esperanto mi decidis agadi antaŭ ol eklerni, kaj al la demando kiun mi aŭdis mil fojojn “Kiel vi sola ŝanĝos la mondon?”, nun mi povus senhezite respondi ke mia laboro atingis centojn da miloj da homoj. Ni ne estas solaj; ni komencas per niaj revoj, kaj ili flamigas la mondon. Ni kapablas ĉion.

Mi kandidatiĝis kiel gvidanto de nia monda organizo ĉar en mia koro fluas deziro je ŝanĝoj, realigemo de ideoj, rekonstruo por alia ebla, por alia enda, estonteco. Tamen, hodiaŭ mi devas fari parentezon kaj entrepreni doloran decidon demisiante kiel prezidanto ĉar, pro personaj kialoj, mi ne povas doni la maksimumon de mi. Ĉi tiu demisio ekvalidos je la fino de la okazanta evento, la 2-an de januaro de 2018.

Mia pasio nur povas kreski. La fokuso pri ŝanĝoj kaj rezultoj restas. Ni revidos nin en la sekva batalo.

Dankon al vi ĉiuj

Sed memoru: TEJO devas esti platformo por la junulara Esperanto-movado.

Enric Baltasar

Suplemento 2

Demisi-mesaĝo de Doniben Jimenez Jaramillo

Karaj TEJO-estraranoj,

Krom pardonpetoj mi simple tajpas por oficialigi kaj konfirmi mian demision, esprimi miajn tutkorajn dankojn al vi kaj tiel faciligi urgajn aferojn kiu blokiĝas per mia neagado, nerespondeco. Bedaŭrinde nek malfacilaĵojn nek ne-alkutimiĝon mi solvis ĝustatempe. Mi tamen dankas la fakton, ke vi pacience volis donaci al mi vian helpon kaj amikecon. Mi ververe miras kaj fieras pri ĉiu el vi, pri tiom da kapablo por daŭre stari sur la unua linio de la batalfronto kaj senhalte antaŭenirigi la movadon. Kuraĝo por tion atingi mi ne certas ĉu iam ĉirkaŭos min, sed dankon al la ŝanco legi viajn ideojn, opiniojn, personecojn kaj tiel plu, mi volas daŭre enterpreni lokajn agadojn (mia vera ĝisnuna loko) kaj tiel piediri laŭleĝe, paŝon post paŝo ene de la TEJO-ekosistemo kaj internacia eo-agado. Kvankam evidentiĝas, mi devas konfesi, ke ankoraŭ mankas tro tro tro da maturaĵoj ĉe mi.

Karaj, mi tute hontas pro mia nesaĝeco kaj longega silentiĝo. Parte mi tion bezonis sed konsekvencoj mi ne antaŭvidis kaj ili iris tiom for... Tio ŝuldigas min.

Mi ne havas rajtojn diri ke espereble ni restu en kontakto sed... Espereble!, projektoj daŭre disvolviĝas kaj homoj pli kaj pli volas kunlabori.

Dankon kaj bondezirojn apud la novaj estraranoj.

Denove pardonpetante,

Doniben Jimenez Jaramillo